Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

La 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto • 17 – 24 julio

# La Kolombo de Paco

**15-a de aŭgusto 2021, numero 18**

Redaktas Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova

## 9-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj 2021: Koncerto de la Premiitoj

**Kantemuloj de la tuta mondo,**

jen lasta informo kaj eblo partopreni en la 9-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj

**Ĝis la 20-a de aŭgusto!**
Enmetu vian filmeton en:
https://www.esperanto-festivalo-vroclavo.eu
aŭ sendu pere de WeTransfer (aŭ simila servo) al: festivalo.eo@gmail.com

Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj
Europejski Festiwal Piosenki Esperanckiej

La Eŭropan Festivalon de Esperantaj Kantoj aŭspicias UEA.

Partneroj estas: Rotary Club de Esperanto – Brasil, ILEI, *Juna Amiko*, Eurokka, Varsovia Vento.

Instigu ankaŭ neesperantistajn kantem ulojn, ke ili fariĝu ambasadoroj de Esperanto kantante en ĝi.

**La Festivalo okazos en tri kategorioj:**

1. Koruso aŭ ensemblo,
2. Solisto,
3. Registrita en studio.

Ĉiu kategorio havas ankaŭ aĝkategoriojn: infanoj, plenkreskuloj kaj pliaĝuloj.

La premioj estos aljuĝitaj **por la unuaj tri lokoj en ĉiu kategorio**. Plie estos aljuĝita **Ĉefpremio** kaj nova premio – **Aŭtora-premio** (ĝin ricevos konkursanto, kiu prezentos plej bone propran kanton). Ĉi-jare, la publiko aljuĝos sian premion, la **Publik-premion**, nur al video-kantoj. La voĉdonado okazos rete ekde la 20-a de aŭgusto.

**La 12-an de septembro** – rete okazos dum la Koncerto de la Premiitoj ankaŭ la anonco de la rezultoj.

**Ni kantu en la lingvo Esperanto!**

**Ĉiu partoprenonto bonvolu alsendi vian videon kun registrita kanto en la lingvo Esperanto kun samtempa alsendo de la partituro kaj la teksto de la kanto – ĝis la 20-a de aŭgusto:**
**https://www.esperanto-festivalo-vroclavo.eu**

**Sekvu la festivalon ĉe EventaServo.org**



# Deklaro de TEJO kaj UEA okaze de la Internacia Junulara Tago, 12 aŭgusto 2021

En 1999, la Ĝenerala Asembleo de UN (RES 54/120) aprobis "la rekomendon de la Monda Konferenco de Ministroj de Junularo (...), ke la 12-a de aŭgusto estu deklarita Internacia Junulara Tago". La starigo de tiu grava tago estis rimarkinda, ĉar ĝi emfazis la centran rolon de junuloj en la publika sfero kaj rilate al nuntempaj aferoj, en kiuj niaj socioj luktas.

Dudek unu jarojn poste, ni povas vidi kiom signifa kaj trafa ĉi tiu aranĝo estis. Efektive, tra la jaroj, junulara partopreno en la kampoj de klimata agado, genra egaleco, socia justeco, paco kaj sekureco kaj aliaj gravaj temoj por Tutmondaj Homaj Rajtoj estis rimarkinda kaj esenca. Junuloj fervore kontribuis al mondo respektema al homaj rajtoj kaj UN-valoroj, kreante ŝancojn kaj esperon por tiuj, kiuj estas en vundeblaj kondiĉoj. Ni povas observi la pliigitan junularan partoprenon en la UN-sistemo, en la Konsilio de Eŭropo, la Eŭropa Unio kaj aliaj demokratiaj strukturoj, kaj ilian unikan kontribuon al la Celoj por Daŭrigebla Evoluigo kaj la Agendo 2030, kie ili "estis aktivaj arkitektoj en ĝia disvolviĝo kaj daŭras okupiĝi pri la kadroj kaj procezoj kiuj subtenas ĝian efektivigon, sekvadon kaj kontrolon."

La Internacia Junulara Tago estas ne nur tago por festi, sed ankaŭ por plifortigi la devontigon de la Membraj Ŝtatoj aktive enplekti kaj konsideri junulojn en siaj decidoj. Ekzemple, la temo de la ĉi-jara Junulara Tago estas "Transformaj Manĝaĵaj Sistemoj: Junulara Novigado por Homa kaj Planeda Sano." Ĉi tiu temo leviĝis ankaŭ dum la Junulara Forumo 2021 de EKOSOK, kie miloj da junuloj aktive partoprenis, kie, laŭ ties raporto, "la elstarigitaj aferoj kaj prioritatoj inkluzivis iliajn vidpunktojn pri la efiko de la pandemio KOVIM-19, aparte rilate al ĝia efiko al homa sano, la naturmedio kaj nutraĵaj sistemoj."

Ĉi tiu tutmonda afero estas pritraktebla nur se junaj homoj estas aktiva parto de la solvo. Tial en la oficialaj rezultaj rekomendoj de la Forumo oni mencias, ke: "junaj partoprenantoj emfazis la gravecon labori por pli justaj manĝosistemoj. Krome, oni reliefigis la bezonon ke junuloj faru informbazitajn decidojn pri manĝaĵaj elektoj per kreskanta tutmonda edukado pri la plej sanaj kaj daŭripovaj ebloj por individuoj kaj por la medio."

Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), kiel monda organizaĵo de junuloj, evoluigis tra la jaroj centran rolon en la internacia kampo de junularaj rajtoj, precipe rilate al kulturo kaj lingvoj, kie junuloj aktive partoprenas kaj rajtas kontribui per siaj ideoj kaj agoj. En ĉi tiu Internacia Junulara Tago, TEJO, en partnereco kun Universala Esperanto-Asocio (UEA), dankas ĉiujn junulojn kiuj kontribuis al nia misio kaj al la unika mesaĝo de nia movado, kaj ni promesas plu batali por junulaj rajtoj, niaj rajtoj, je tutmonda nivelo.

***El la Gazetaraj Komunikoj de UEA:***
***https://uea.org/aktuale/komunikoj***

# Forpasis Prof. d-ro György Nanovfszky (10.04.1942 – 10.08.2021)



La 10-an de aŭgusto 2021 forpasis Prof. d-ro György Nanovfszky.

Sube vi povas legi la mesaĝon de János Nagy, vicprezidanto, operacia gvidanto de Hungaria Esperanto-Asocio:

*"En la nomo de la estraro de Hungaria Esperanto-Asocio mi sciigas kun afliktita koro kaj profunda doloro, ke prof. d-ro György Nanovfszky, nia altestimata prezidanto, Honora Membro de UEA, emerita ambasadoro de la Hungara Respubliko, ekonomo, politologo, religihistoriisto, titola altlerneja kaj universitata lekciisto, plurlingva diplomato en kvin kontinentoj, verkinto de dekoj da libroj kaj monografioj, d-ro pri lingvoscienco kaj elstara interpretisto de la lingvo Esperanto forpasis la 10-an de aŭgusto 2021, en la 79-a jaro de sia vivo, al eterna ripozo.*

*Kun sia morto li postlasis grandan mankon en la vivo de Esperanto. Lia multflankeco, lia personeco kun elstaraj kapabloj kaj lia spirita valoro restos ekzemplodone eterna memoro por ni. Kun sia tria edzino li vivis 39 jarojn en strikta kunesto.*

*La estraro esprimas sian profundan kondolencon al la familio. La esperantistoj kunsentas kaj dividas la nekonsoleblan doloron.*

*Ni adiaŭas lin kun afliktita koro. Li ripozu en paco!*

*"Kiu vivas kun amo en la koro, tiu ne mortas, nur forestas..."*

# AMO 76 altiris grandan publikon per riĉa programo

Stefan MacGill

La dua Virtuala Esperanto-Kongreso de ILEI (VEKI) gastigis la 76-an Seminarion pri Aktivula Maturigo (AMO), kun du temoj, traktataj en tri sesioj en du el la kongresaj tagoj. La unua kaj tria sesio havas la temon: 'Edukado pri / al / per Esperanto-kulturo'. Tiuj okazis en la lundo kaj la merkredo de la kongresa semajno. La dua sesio frue en merkredo havis la temon: 'Efika instruado tra Afriko'

Tiu dua sesio okazis tre frue (05:00 UTC) por ebligi partoprenon de homoj en Azio kaj eĉ Oceanio. ILEI havas aktivajn sekciojn en pluraj aziaj landoj, kaj organizas siajn virtualajn kongresojn por ebligi partoprenon el ĉiuj tempozonoj. Por tiuj, kiuj ne partoprenis, la debato estas spektebla ĉe:
https://youtu.be/8Cwv_QJJLL0

La unua sesio okazis la 9-an de aŭgusto tra kvar kaj duono horoj kun 61 partoprenantoj el 26 landoj tra kvar kontinentoj: Armenio, Barato (Hinda Unio), Belgio, Brazilo, Britio, Ĉeĥio, Ĉinio, Danlando, Francio, Germanio, Hispanio, Hungario, Irano, Italio, Japanio, Kanado, Koreio, Kroatio, Latvio, Nederlando, Pollando, Reunio, Rumanio, Serbio, Svislando kaj Usono.

Post la formala malfermo, bonvenigo kaj enkonduko la programo disvolviĝis jene:

**Katalin Kováts:** 'Strukturo kaj gradoj de la instruistaj lertigaj programoj'. Ŝi prezentis tre detalan kaj valoran statistikaron, plej interese pri la variaj niveloj de kvalifikado, unuavice de la lingvo-kapablo. Ŝi pluiris al la mondo de revoj, pri la rezultoj se funkcius por Esperanto Ministerio de Edukado, kiu starigus normojn kaj studplanojn.

**Renato Corsetti:** 'Lingvo monda en eŭropa saŭco lingva kaj kultura'. Li klarigis la ecojn kaj atingojn de Zamenhof kaj la lingvo. Li montris kiom forte eŭropaj kulturaj nocioj penetris en Esperantiston kaj pledis, ke azianoj pli forte kontribuu al tiu kulturo. Lia lumbilda prezento estas alkroĉita.

**Mireille Grosjean:** 'Esperanto-kulturo en Esperanto-kursoj'. Gravas eviti stereotipojn en kurso-frazoj kaj niaj edukaj materialoj. Ŝi emfazis, ke parolantoj el aliaj mondpartoj havas aliajn stilajn manierojn esprimi sin en Esperanto kaj pledadas en IPR – la oficiala organo de ILEI – akcepti tiujn alternativajn stilojn, kondiĉe, ke temas pri nenio rekte erara. Ŝi elstarigis la valoron de *Juna amiko* disvastigi diversajn kulturojn, pere de ĝia ege internacia reto de kontribuantoj.



**Stefan MacGill:** 'Esperanto-kulturo en nia edukado'. Li aliris la temon laŭ du direktoj. Unue, manieroj prezenti la kulturon laŭ la aĝgrupoj, due, laŭ la homaj sensoj aktivigataj dum la aprezo aŭ kreo de kulturaĵoj: aŭskultado, rigardado, parolo, gustumado kaj plenumado.

Sekvis fruktodona diskutado kun deko da intervenantoj. Poste, la daŭrigo:

**Monika Molnar:** 'Kulturkruciĝoj en la klasĉambro'. Ŝi skizis la mirindan progreson de la tute oficiala Esperanto-programo en privata, progresema lernejo 'La Granda Ursino' en La Chaux-de-Fonds. Tiom ampleksa kaj alloga programo floras danke al la progresema karaktero de la lernejo. La kulturo rolas centre en la programo, kaj forte kontribuas al la entuziasmo de la lernantoj, pro la riĉaj ligoj kun foraj kaj instigaj landoj.

**Laura Brazzabeni:** 'Instruado de Esperanto pere de la reto'. Ŝi prezentis la spertojn en la itala movado, kiu multe laboris por pretigi kaj proponi retajn kursojn, interagajn kaj unudirektajn (nesinkronajn) kursojn, da kiuj IEF proponas du: KIREK kaj KAPE. Ŝi plie resumis la pli gravajn fontojn de perretaj suplementaj ebloj kaj rimedoj. Ŝia prezentaĵo alvenis kaj estos alkroĉita al iu baldaŭa EKO-komuniko. (Ni dissendas ilin en ordo de livero, por kuraĝigi al diligenteco).

Sekvis dua diskutotempo antaŭ la fermo de la unua tago de la seminario.

*El EKO-33*

# 100-jara datreveno de Lucija Borčić

Lucija Borčić (26.7.1921–14.11.2015) dum sepdeko da jaroj donis nemezureblan kontribuon al la disvastigo de la kroata kulturo, ĉefe la verkita vorto. Dank' al ŝiaj tradukoj al Esperanto, verkoj de la kroataj aŭtoroj atingis eĉ la plej forajn regionojn de la terglobo, ĉar ne ekzistas lando en kiu loĝas eĉ la plej malgranda nombro da Esperanto-parolantoj, en kiu ne alvenis iu el la tradukverkoj, al kiuj ŝi kontribuis. Ŝi estis la plej fruktodona tradukistino de la kroata literaturo al Esperanto kaj inter la plej fruktodonaj tradukistoj ĝenerale.

Ŝi estis Honora Membro de Universala Esperanto Asocio (2001) kaj membro de Akademio Literatura de Esperanto (iama Esperantlingva Verkista Asocio).

Okaze de la jubileo, Kroata Esperantista Unuiĝo dum la sesio de Virtuala Movad Forumo prezentis ŝian verkaron.

# Jam eblas aliĝi al BET-56

Kiel jam estis anoncite en *La Kolombo de Paco* (n-ro 3) la 56-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET) okazos en la urbo Klaipėda, Litovio, 9–17 de julio 2022 .





Nun vi jam povas aliĝi al BET-56 per la reta aliĝilo: https://mallonge.net/gl, aŭ uzante la retejon http://esperanto.lt, kie eblas elŝuti la aliĝilon plenigeblan paperforme (sed preferinde sendatan retpoŝte).

En la sama retejo vi povas trovi la Informan Bultenon pri BET-56 kaj multajn informojn pri la aranĝo.



# Speciala oferto de la Libroservo

La 19-an de aŭgusto 1936 estis murdita la hispana verkisto Federico García Lorca (n. 1898). Okaze de la 85-jariĝo de lia morto dum la tuta monato ni ofertas lian *Ciganan romancaron*, kiu ĉi-jare festas sian 50-jariĝon, kun triona rabato sendepende de la mendita kvanto.
https://katalogo.uea.org/?inf=3166




# Fondaĵo Canuto

Multaj arde deziras membriĝi en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via donaco al Fondaĵo Canuto helpos nin teni la kontaktojn kun tiuj, kiuj suferas pro transpagaj baroj. Antaŭdankon pro via solidareco!